

AVENO # 39 - AGADO de AVE kaj de AVEanoj

Januaro - Decembro 2013

Jen ĝeneralaj informoj pri AVE kaj aliaj CSO-oj kaj diversaj peticio-petoj, aliaj trovighas je Ekologio & Homaj Rajtoj

La kotizo por AVE estas libervole paginda: A-Landanoj kaj riĉuloj: 5 EUR, aliaj 2 EUR / jare

Paginda al nia UEA-Konto: avex-z

Konto de UEA: IBAN: NL72INGB0000378964, BIC: INGBNL2A

Noto: (de "via nomo" por Kto. **avex-z**)

Elkoraŭ dankon - Manfred Westermayer, la sekretario.

Adreso: AVE, Kandelstr. 62, 79194 Gundelfingen/Br., Germanio

Retejo de AVE: <http://www.verduloj.org>

Nia interreta diskutejo trovighas je Ipernity, tie serchu la grupon "Verduloj"

Koncizaj informoj:

Kunvenoj de AVE-anoj:

1984 - 2014 AVE kunvenos por festi la 30-jarighon:

2014-07-06/12 Rijeka, Kroatio, okaze de la EEU-Kongreso ? (mi jam alighis)

Chu en la UK en Buenos Aires ?? (mi (Manfred) supozeble ne) - kiu emas organizi la kunvenon ?

Chu en la SAT-kongreso en Bretonio ? (eble jes)

Chu ni aktivu okaze de la baloto-kampanjo(j) por la Europa Parlamento ?

Ni ĵhus tradukis la Manifeston de la Federacio de Junaj Europaj Verduloj.

Datumbazo de Esperanto-parolantaj organizajhoj: <http://per.esocom.de/index.html>

Esperanto Internacia plenigas truon en la Esperanto-movado.

informoj vi trovos je la adreso donita en <http://www.stiftung-mondo.de>

La projekto <http://www.lingvo.info> celas provizi informojn pri lingvoj kaj diskonigi plurlingvecon en la interreto ...

La retejo estos havebla en almenaŭ 17 lingvoj ekde sia lanĉo.

Internaciaj Ago-Tagoj (nur kelkaj)

01-27 : Rememortago pri la kruelajhoj de la fashismo (liberigo de la koncentro-lagero Auschwitz)

02-21 : Internacia Tago de la Patrino Lingvo

03-21 : Tago de la Mondcivitanoj

03-22 : Internacia Tago por la Akvo

04-20 : Tago de la Tero

05-09 : Europa-Tago

05-21 : Internacia Tago por la Kultura Evoluo

06-11 : Internacia Tago de la Lingvoj

AVE-anoj subtenas evoluon de 3 subtenindaj afrikaj projektoj kiuj uzas Esperanton:

en Tanzanio kaj D.R. Kongo (Mazingira, PIEADC, SBV)

SBV - Solidareco Bona Volo en Goma, D.R. Kongo

Vidu pli chi-sube au en nia retejo: <http://www.verduloj.org/afriko.htm>

--- ---

2013-10 **Kion faras Esperanto che UN ?**

Nia okpersona laborgrupo en Novjorko tenas kontakton kun la stabo de UN, kun ambasadoroj kaj diplomatoj, kaj kun neregistaraj organizajhoj. Samtempe ni ankaŭ faras nian eblon informi la esperantistojn, pere de la asocio Esperanto por UN, pri la gravega laboro de UN por krei pli bonan kaj pli justan mondon.

Bonvolu sendi al ni vian financon kontribuon por helpi, ke la oficejo en Novjorko restu malferma kaj plivastigu sian agadon. Montru la vojon al aliaj per via kontribuo. Dankon!

La plej facila maniero sendi iun ajn sumon estas ĝhiro al nia UEA-konto "novj-w".

Kaj jen ilia retejo: <http://www.esperanto-un.org>

2013-08 AVE & Afriko - **Tanzanio, Mazingira & sunflora oleo**

La plej aktuala projekto de Mazingira petas subtenon por aĉeti premilon por sunfloro-semoj, kiujn ili jam semis. Ĝhis la fino de Augusto flanke de 2 AVE-anoj ni pagos 1000 Eurojn, la aparataro kotos 2800.

Rezulto: **AVE-anoj kolektis 1500 Eurojn - elkoran dankon !**

Bonvolu transpagi au al la konto de Fonduso Mondo: (eblas nur ĝhis fino de 2013)

<http://www.stiftung-mondo.de/esperanto/haupt.html>

al la konto de FEL (SWIFT-kodo): <http://kono.be/mazingira/eo.html>

au al la UEA-konto de AVE: avex-z

Bonvolu noti: "Mazingira, oleopremilo"

Komento (2014...):

La projekto daŭre bezonas subtenon por ebligi al orfoj daŭrigi en lernejo post la tria klaso;

alia projekto: Instrui Esperanton en la Esperanto Secondary School ne estas pagata de la ŝtato.

2013-08 AVE & Afriko - **D.R.Kongo, PIEADC & trinkakvo**

La plej nova projekto subtenita de AVE estas en Kalima/ provinco Maniema, organizita de Etienne Katchelewa Kandolo, kiu studis agrikulturon. Ilia ĉefa temo estas kultivi legomojn kaj fiŝojn; sed alia grava temo estas la provizo de salubra trinkakvo (ne-malsaniga) - mi jam raportis.

La mezgranda firmao Wasserkraft Volk (WKV), kiu produktas akvoforto-turbinojn kaj generatorojn subtenas CSO-ojn (civil-sociajn organizojn, = NRO).

WKV nun subtenis per 3000 euroj la komencan etapon de la trinkakvo-projekto por kvartalo de la urbo Kalima. Mi esperas ke la realigado bone funkcios.

Krome ili subtenis la grandan Virunga Nacian Parkon - inter la montaro kaj la grandaj lagoj - per mezgranda akvoforto-generatoro, kiu ebligas naturafablan evoluon en tiu regiono.

<http://gorillacd.org/2012/10/17/electricity-from-the-park-to-the-people/>

<http://www.verduloj.org/afriko>.

(aliaj informoj senditaj trovighas je la fino de tiu-chi AVENO)

2013-08 **AVE kunvenis** ankau okaze de la **SAT-Kongreso 2013 en Madrido:**

Kelkaj AVE-anoj kaj pluraj aliaj kunsidis enkadre de la Ekologiista Frakcio okaze de la SAT-Kongreso 2013 en Madrido. Ili diskutis kaj subtenis la ekologi-rilatan proponon por la Deklaracio de SAT - kune kun la Vegetarana Sekcio - organizita de Pierre/Shtonchjo.

Jen la fina versio de - iomete pli detala - proponita teksto:

SAT atentigas pri la malekvilibriĝo de la tuttera ekologia sistemo,

<http://eo.wikipedia.org/wiki/Ekologio>, kaj pri la neceso ŝanĝi ne nur ekogirilitajn homajn kondutmanierojn, sed ankaŭ la socian sistemon mem al tia, kia ebligas enradikigon de daŭripovaj, ekologie respondecaj praktikoj.

Por rememori: AVE decidis en 1999 kunlabori kun SAT. Kelkaj AVE-anoj (i.i. la sekretario de AVE, Manfred Westermayer) partoprenis la SAT-kongresojn en Moskvo (2000), La Chaux-de Fonds, Parizo kaj Beogrado.

Stella de Weerd estis unu el tiuj originalaj ekologiemoj ene de SAT (pli frue ol mi (mw)).

2013-07-25 **AVE-kunsido** okaze de la **98-a UK de UEA en Rejkjaviko**

Kristoforo raportis koncize, ke partoprenis 13 homoj el 9 landoj. La ĉefa temo estis atomenergio. Je la Asocia Foiro kie AVE trovighis apud TEVA - la Vegetaranoj - trovighis „Plano B“, Lester Brown, tradukita en Esperanton, kiu montras ne nur problemojn sed ankau elir-vojojn.

2013-08-25 / 09-01 **La Kulturo(j) de Daurigebleco** -- 5a Internacia Somera Lernejo, Kolonjo

Chu daurigebleco estas teknologia au krea defio ?

Chu politika au ekonomia tasko ?

Chu afero de tradicio au novigado ?

Oni invitas studentojn pri disajno kaj aliaj fakoj por lerni, esplori kaj eksperimenti.

(lingvo: en) <http://www.sustainable-summer-school.org/>

2013-06-24 **Turkoj nun manifestacias** en multaj urboj: **silente, senmove** - tamen aktive. Iu aktoro havis la ideon, komencis, kaj oni akceptis tian metodon.

2013-06-17 De <ericlee@labourstart.org> - sendita al AVE-anoj .

Gokhan Bicici estas amiko de mi.

En 2011, li invitis LabourStart realigi sian jaran konferencon "Global Solidarity Conference" en Istanbul. Mi bone remoras la konversacion: ni sidis en kafejo proksimume de Gezi Parko, rekte sur Taksim Placo. Lastan nokton, Gokhan fimis la demonstraciojn.

Li estis brutale atakita de la policistoj kaj deportita.

Ne kredebla, la atako estis filmita kaj Vi povas vidi la tuton filmon chi tie:

<https://www.facebook.com/photo.php?v=10201308689182667>

Se Vi uzas Fejsbuko (Facebook) bonvole diskonigi la videon vaste.
Dum mi skribas tiujn vortojn, pli ol 11.200 homoj jam faris tion.
Sed pli ol 60.000 el Vi, ricevante tiun chi mesaghon, ankoraŭ ne subskribis la aktualan LabourStart-kampanjon, kiu postulas finigon de la polica perforto en Turkio.
Se Vi jam subskribis, bonvole kuraghigu Vian sindikaton diskonigi la novajhon retroŝte al la membraro. Tiu chi estas la plej granda interreta kampanjo de LabourStart kun pli ol 18.300 mesaghoj al chefministro Erdogan. Mi opinias, ke ghi povus farighi ech pli granda.

Pri Gokhan Bicici la Independent Media Center (Sendependa Komunikila Centro) skribas:
"Li ricevis lezon de brovo, lia gasmasko estis detruiĝinta, lia iPad estis konfiskita, kaj la polico atendigis lin - vundita kaj mankatenita - kelkajn horojn kaj li ne estis informita al kie oni deportos lin kaj ne lanchis oficialan procedon. Ekde 22:30 nia amiko estis arestita en polica veturilo antaŭ la Taksim Kultura Centro kaj estis informita, ke li estos portata al la Istanbula Polica Direkcio. Ni strikte kondamnas la malbontraktadon de Gokhan Bicici kaj postulas ke li estu liberigita senprokraste. Ankaŭ ni postulas, ke la responsuloj - kiuj estas klare videblaj en la diversaj dokumentoj kaj videoj en la Sociaj Retkomunikiloj - estas malkashitaj kaj portitaj antaŭ jughejo." Ankoraŭ li estas en polica aresto.
Informu la mondon. Kreu la kampanjon. Koran dankon. Eric Lee
http://www.labourstartcampaigns.net/show_campaign.cgi?c=1858

2013-07 **Ekspedicio en Mediteraneo esploras la poluon per plastajhoj** kaj miko-plastajhoj.
Se vi interesighas partopreni bonvolu viziti:
<http://www.expeditionmed.eu/fr/fr/campagne-d-eco-volontariat-a-bord-du-voilier-de-l-expedition-med-juillet-et-aout-2012/>

2013-05 **TEJO ofertas infomilon pri organizaj taskoj:**
http://pej.pl/wp-content/uploads/2013/05/Superrigardo_de_taskoj_por_eventoj.zip

2013-07-20-27 **AVE invitas al Alternativa semajno** en Greziljono <http://gresillon.org/s3>
ATENTU: Membroj de TEVA au de SAT-Vegetara Sekcio povas peti mon-helpon de la Veg(etar)ana Solidar-Fonduso por restado. Bonvolu kontakti Shtonchjon: shtonchjo@gmail.com
Komento: AVE ne partoprenis oficiale, char tre malmultaj alighis, sed kelkaj AVE-anoj aktivis.

2013-08-02/10 Okazontas **internacia tendaro kontraŭ landlimoj.**
Law mi, tio estas bonega okazi montri ke eblas efektive paroli en esperanto se ni estas plurope - aw paroli pri esp-o se sole.
La ekzakta ejo ne jam sciatas. Detaloj aperu je <http://www.nobordercamp.nl>
Se vi intencas partopreni gxin, pretas "prelegi" pri esp-o en lingvoj (mi povas nur fari en angla, germana kaj nederlanda) aw volas oferti tranoktejon en Rotterdam, bonvolu kontakti min.
invito de Ronaldo Nobel: ro-esp@dds.nl

2013-12-29 / 2014-01-04 Kvina Afrika Kongreso de Esperanto, Kotonuo, Benino
organizata de Afrika Komisiono de UEA (AK), Asocio de Beninaj Esperantistoj (ABeE), Scio Sen Bariloj (SSB), <http://www.esperanto-afriko.org>, ret-adreso: ake-2013@yahoo.com
bloga de: mirejo3.blogspot.com

2013 Stato de AVE - konciza raporto pri 2012:
La nombro da membroj ne multe shanghighis, dum 2012 alvenis deko da novaj, sed supozeble aliaj elfalis senkomente. Pro manko da mono ni ne emas enketi kiu vere estas membro - la membro-kotizo de AVE ja estas libervole paginda.
Tamen alvenas kotizoj, poshtmarkoj kaj ech donacoj aparte por la Afrika-Agado, por tiuj mi dankas elkore ! En la man-kaso mankas 1200 Euroj, kiu de jaro al jaro mal-sumighis.
Nia UEA-konto sufichas por pagi la kotizon de AVE kiel fakasocio, sed ne por okazigi kunvenon enkadre de la UK. Nian semajnan retan bultenon AVENO legas pli ol 200 ricevantoj.
La agado por subteni kaj partopreni la Tutmondan Kongreson de la Verduloj en Dakar 2012 kostis multon (mankaso); la sekva estos en 2017 (au 2016) en Europo, kaj ni planos aktivan kunlaboron.

2013-02-09 **Parizo: ECOMED renkontighas - franclingva ekologi-subtena asocio**
Programo: protekti la maran naturmedion, kaj batali kontraŭ la poluado de la Mediteraneo pere de mikrofibroj kaj aliaj plastajhoj. En kunlaboro kun eko-volontuloj, migrada ekspozicio.
(lau Bruno Dumontet, Expédition MED, www.expeditionmed.eu)
Kelkaj retejoj kiuj ofertas okazajhojn por via informo:
kastelo@gresillon.org

Bonvolu ne forgesi la projektojn de afrikaj esperantistoj - AVE subtenas PIEADC en D.R.Kongo kaj Mazingira en Tanzanio. Pli sur nia retejo: <http://www.verduloj.org/afriko.htm>

Afrika Agado de AVE: (stato en Junio 2013)

PIEADC estas neprofita asocio por evoluiĝo kreita 2006 de **Etienne KATCHELEWA** kaj aliaj dum sia universitata studado pri agronomio, cele lukti kontraŭ la malriĉeco en la urbeto Kalima/Maniema, D.R.Kongo. PIEADC signifas: Agronoma programo de iniciatoj kaj enkadriĝo por la komunuma disvolviĝo. Ĝi posedas ejojn por brutaro kaj oficejon, kaj havas lagojn kaj aliajn kampojn, por la vilaĝanoj kun kiuj ni kunlaboras. **Kelkaj fishlagoj estis riparitaj, sed atendas pliaj 30.** Ili donas laboron al fishistoj kaj nutrajhon por la urbanoj. Fridujoj povus helpi plilonge konservi la kaptitajn fishojn. La kooperativo instruas la kamparanojn kiel bredi fishojn (Tilapia).

La taŭga periodo por plibonigi lagojn estas dum la sen-pluva sezono, fine de Majo ĝis la unua semajno de Oktobro.

Alia granda projekto estas **plibonigo de trinkakvo-provizo por la urbo de 180.000 homoj.** La plejmulto de la homoj prenas akvon el 6 fonto-kranoj, kio dum la pluvsezono ne estas sufiche pura. Ekzistas pumpilo el kolonialisma tempo, konstruita de belga firmao SOMINKI. Sed ghi bezonas riparon kaj energion. Krome necesas purigi la trinkakvon por eviti malsanojn.

Mi sendas volonte la detalajn planojn pri tiuj du projektoj; metas ilin sur nian retejon.

AVE-anoj jhus subtenis PIEADC per 300 Euroj, mono kiu estas uzata por plibonigi unu au du fishlagoj.

Sed por la trink-akvo necesas multe pli - por tio necesas pli granda fonduso.

La UEA-Konto de PIEADC: **ekkn-y**

&

Mazingira (Svahila: medio): la projektaro de **Mramba Simba en nord-okcidenta Tanzanio.**

La mezlernejo "Esperanto Secondary School" estas grandparte finkonstruita.

La dua klasej-domo bezonas ankoraŭ tegmenton, kion pagos la regiona registaro, kiam ili havos monon.

Sed akute **mankas pordoj, plankoj kaj fenestroj por la Administrejo - (2 aloj * 800 Euroj)**

mi petas vin subteni ghin - AVE mem povas transpreni 100 Eurojn, dank al revenintaj libroj.

Intertempe la instruistoj & sekretario uzas unu el la 3 klas-chambroj.

Se chiu dua el la AVE-anoj, do, ekz-e **vi, transpagas 10 - 20 Eurojn** ni sukcesos.

Transpagoj por Mazingira: UEA-Konto de AVE: avex-z "Mazingira, lernejo; de via nomo"

Vi povas ghiri la monon al la **UEA-konto** de la Flandra Esperanto Ligo, Frankrijklei 140, 2000

Antwerpen kun la mencio: "Mazingira lernejo - via nomo " - au rekte al la bank-konto de FEL:

IBAN: BE66 0000 2653 3843; BIC: BPOTBEB1

www.kono.be/Mazingira/